

PROKOKOLO: Estrarkunsido de ILEI

Nov 27-30, 2009. Roterdamo. Parto 2.

Ĉeestis: Estraranoj Duncan Charters (DC), Stefan MacGill (SMG), Małgosia Komarnicka (MJK), Radojica Petrovic (RP), Zsófia Kóródy (ZK), Julija Batrakova (JB). Reprezentanto UEA: Claude Nourmont, Komisiito: Ana Montesinos, Vizitantoj: Kristin Tytgat kaj Rob Moerbeek.

Dimanĉo 29.11.2009

MJK, SMG, RP, AM, DC, JB, kaj posttagmeze CN, poste gasto Kristin Tytgat (KT).

Ligaj dokumentoj kaj librostokoj ĉe IEI

MJK signalis, ke ŝi ne ricevis ĉiujn necesajn dokumentojn de Atilio. Tio estos solvebla nur poste, ĉar la ILEI-materialoj (libroj, dokumentoj, komputilaj enhavoj...) devas esti liberigitaj de IEI. 222 ĵus alvenintaj manlibroj estas ne inventaritaj, pliaj librostokoj kuŝas tie, multaj dokumentoj estas en la komputilo. Necesas determini kio al kiu apartenas. Probable ĉio estos farita ĝis 30 januaro 2010. Ni antaŭvidu ne plu rajti uzi la adreson de IEI kiel nian juran sidejon (ĝisnuna oficiala adreso de ILEI), la nova adreso de ILEI fariĝu la adreso de UEA; pri tio SMG interparolis kun Osmo lunde, kaj tio estas akceptebla. Tion ni realigos post kiam la nova estraro estas registrita. [Postnoto: intertempe farita]

Modifo de programo pro pli frua forveturo de RP.

6.6 Movadaj rilatoj - eldonpropono

RP proponas ke ILEI kuneldonu 'Lernu-gramatikon' kiu estas uzebla kaj estas en la interreto (lernu.net), ĉar PMEG estas tro dika, merkato estas interesata je fizike presita libro, amplekso 300 paĝoj, B5, eldonaj kostoj por 500 ekz. estas € 3000, el kiuj ILEI pagu €1000, eventuale el Fondaĵo Szerdahely. Eldono kun paralela terminologio por fakuloj kaj nefakuloj: ekz. akuzativa kazo kaj objekta kazo. Kunlaboro: ILEI, E@I, Lernu.net... . ZK – komparu kun la ekzistanta „Esperanta gramatiko“ de Malovec. JB: ni bezonas bonan kalkuladon; ILEI ne povas havi deficiton. RP: la laboro de Bertil Wennegren estas jam pagita de Lernu.net, nia kontribuo rilatas nur al presado; ni ricevos trionon de la stoko. SMG: la rendimento por ni dependas kiom ni vendas rekte kaj kiom tra libroservoj (ekz tra UEA). La cela vendoprezo estas €10, kaj ni pagas €6 por ĉiu ekzemplero kaj donas trionan rabaton al aliaj libroservoj, restas al ILEI nur €0,60, kiu eĉ ne kovras la sendokostojn, por ne paroli pri administraj kostoj. Por indi ni devas aŭ altigi la vendoprezon aŭ vendi plejparte rekte al klientoj. ZK/SMG – kiujn financajn rimedojn ni havas... mankas listigo de ĉiuj fondaĵoj kaj kapitalaj kontoj kaj ilia nuna stato. [Postnoto: tamen ekzistas kiel fine de 2008]. Estas multaj bezonoj, ni faru prioritatajn kaj vidu ciferojn. JB: ni ne havas fermitan buĝeton; nun ni ne scias ĉu la krakova konferenco donos profiton aŭ ne. **Konkludo:** RP faros pli precizan proponon: disdivido de stoko (166 por ILEI?), vendo-rajtoj kaj limigoj, posedanto de la materialo, kondiĉoj por represoj, provlegado flanke de ILEI, temposkemo ktp. Tiam ni revenos al la propono, vidante la staton de la fondaĵoj kaj la konkurencaj projekto-bezonoj.

4.5 Subtenpeto al UEA por 2010:

Necesas tion prezenti por 2010 ĝis 12 de januaro. Tio nun estas buĝetita je €1750; ni devas bone motivi tiun peton. Jen malneto de petoj al UEA:

- € 500 trejnseminario en Kubo en la konferenco julio 2010 (kun Amerika Komisiono de UEA). Nia sumo apogu la ĉeeston de kubaj kolegoj.
- € 500 trejnseminario en Ĉinio (subteni sekciestron Arko, aŭg 2010) kaj subteni rezultojn de la prieduka renkontiĝo en la Azia Kongreso en Mongolio (junio 2010)

- € 500 por pretigoj por trejnseminaria aŭ alia agado en Afriko, inkluzive la pretigon de subvencijetoj al ekstermovadaj monfontoj.
- € 500 por trejnseminario pri subvencijeto (Provizore SPSP – Seminario Pri Subvencio-Petado) planata por oktobro 2010 en Herzberg. Ni havas spertulojn kiuj petis sukcese subvenciojn ekzemple por projektoj ĉe Comenius (Lifelong Learning Program) de Eŭropa Unio. Nia celo estas vastigi komprenon pri la ĉefaj projektoj kie eblas ĉerpi subtenon.

Sekve la sumo de la peto estas €2000. [Postnoto: peto liverita jan 6, 2010, akceptita jan 12.].

Aldone al tio, ILEI planas en 2010 ripeti la stipendiadon de du partoprenantoj en la unujara instruistotrejna kurso ĉe UAM (Uniwersytet Adama Mickiewicza), kaj alvokas al UEA simile subteni du stipendilojn, tiel ke ni anoncu aprile kvar stipendiojn. [Postnoto: UEA akceptis, jan 12, 2010].

4.5.1 Financado de aliaj projektoj

RP anoncas planojn por ILEI-seminario en SES (Somera Esperanto-Studado) en Slovakio komence de Julio 2010. Okazos 4 ŝtupoj de KER-ekzamenoj kaj miksitaj seminarioj. ILEI ofertu stipendiojn por 10 kursanoj, ekzemplaj kostoj : kotizo € 20, €80-88 eu por 3 manĝoj, € 64 por 8 tranoktoj = po unu kursano €172. Oni ne subvenciu kompletan vojaĝkoston. (por instruisto €208). Por partoprenanto ni ofertu €100. La financado venu el Fondaĵo Interkulturo, ne el la kurantaj kontoj de ILEI. Tiu fondaĵo havis €12269 fine de 2008. Antaŭvideble ĝi malkreskis je ĉ. €3000 en 2009 pro afrika agado. Do, en 2010 ĉ. €3000 dediĉeblas al SES kaj simila sumo al la latinamerika seminario dum la ILEI-konferenco. ILEI kaj la Amerika Komisiono anoncu konkurson por trovi la plej indajn partoprenantojn.

ZK pledas ke ni listigu niajn pli signifajn elspezo-planojn, akiru superrigardon de niaj kapitalaj rimedoj kaj starigu prioritatojn. Ni devas subteni instruistan trejnadon, instruadon, lernejan agadon. Mankas strukturo, kial ni ne rilatas al la instruista rolo... kial ni ne agas kiel instruista organizaĵo... laŭ statuta kaj laŭcela agado - ĉu tiu celo aŭ tiu rimedo estas grava. RP: Interkultura kaj instruista trejnado estas la plej grava kampo; ni ne atendu pli ĝeneralajn planojn. DC: Inturkultura Fondaĵo estas por specialaj celoj. SMG: Necesas publikigi la celojn kaj kondiĉojn de niaj fondaĵoj.

Decidite principe subteni la eldonon de la gramatiko de lernu.net ĉar ĝi estas potencie komerce profitiga, tiel ke ni rehavu la kostojn ene de unu jaro. ILEI konsentas investi € 1000, interalie por teni bonajn rilatojn inter E@I, Lernu.net kaj ILEI. Ni komisiis al RP liveri precizajn informojn pri kostoj kaj kontrakto.

RP rakontas pri Kongo; estas kunlaboro kun universitato en Kinshaso (Pedagogia Instituto), pliaj projektoj atendas kreon kaj stabiliĝon de ILEI-sekcio. Ili alte aprezus trovon de profesoroj pri matematiko kaj informatiko. Necesas trovi subvenciojn por estontaj aranĝoj.

Pri Kubo, ĉeestontaj estraranoj instruu dum la seminario, por tiel helpi la ĉeeston. La konferenca buĝeto estu apartigita, tiel ke seminarianoj ne devu pagi la plenajn kostojn, ekz. por ekskursoj. Tio malaltigos la kostojn de subvencio. Decido: la seminario dum la ILEI-Konferenco en Kubo havu du aranĝantojn: La Amerika Komisiono (AK) de UEA (ili donos €2000) kaj ILEI (subtenos el 'Interkulturo'; ni agnosku seminarianojn kiel konferencanojn. La Kaso Dazzini estu la sola listigita sur la konferenca aliĝilo – ni per tio (kaj la sumo de UEA) kovru partoprenon de kubaj instruistoj en la konferenco kaj seminario.

Sekve de la spertoj en la seminario en Kubo, ILEI konsideru ĉu starigi kason por Latin-Ameriko, simila al tiu por Afriko, cele ekzemple a sekva seminario en la regiono en 2011-2012.

Estrara komunikado:

Necesas plibonigi la internan estraran viki-paghon [farita]. Propono de ZK ekuzi vikiservojn de Google pere de la estrara grupo estas akceptita. [sed ankoraŭ realigenda!]

RP foriris direkte al Skandinavio.

8.1.2 Konferenco Kubo – laborprogramo

SMG proponas skemon por la labora parto de la Kuba Konferenco (fundamente malsama kiel en Krakovo). La Komitato kunsidu en la unua plena tago tra 160 min. por diskuti la faritan laboron kaj starigi laborgrupojn. Ĉiutage tiuj laborgrupoj (lerneja agado/universitata agado/komunikado/...) laboru tra 80 min, inkluzive de 10 minuta paŭzo, sub la gvido de la respondeca gvidanto aŭ estrarano. Laŭeble tiu labora bloko okazu samhore ĉiutage. En la lasta plena tago la Komitato/Asembleo kunsidu denove dum 80 min por aŭdi rezultojn de la laboro kaj plani la agadon ĝis la sekva konferenco.

Alvenas gasto Kristin Tytgat, kiu resumas subvencieblojn pere de disdonita resum-dokumento.

KT informas pri EU-programoj: eblecoj por Esperanto

- E-o estu ilo kaj ne celo en EU-programoj; realigeblaj celoj necesas por bonaj subvencipetoj.
- Ni bezonas universitatajn personojn, kiuj deziras kunlabori; ekzistas demando per kiu kunlaborantoj povas anonci sin.
- Gvidilo por la agado estas la prelego de KT en <Krakovo EU-programoj: eblecoj por Esperanto> [kiu aperos en IPR 2010/1].
- Kunlaborantoj respektu la regulojn kaj prioritatojn de EU. BRIC-landoj estas taksataj gravaj: Brazilo, Rusio, Hinda Unio, Ĉinio
- Indas prepari duflankajn kontraktojn inter universitatoj (ke ni ne pagu vojaĝ-, tranokt-, manĝ-kostojn, por realigi tiun kunlaboron).
- Instituto Erasmus en Bruselo, universitato en Kaunas (Aida Ĉizikaite), kaj UAM en Poznań (Ilona Koutny) jam starigis duflankajn kontraktojn.

Grundtvig-projektoj rilatas al instruado al plenkreskuloj (i.a. tra Universitatoj de la Tria Aĝo); oni bezonas preparitajn organizojn, en ĉi tiu momento eble povas esti Herzberg. Tie jam okazis Grundtvig-projekto (Pollando /Germanio /Slovakio) kaj Grundtvig Asistanteco (individua volontulo).

KT intencas partopreni en informtago en Bruselo la 7-an de decembro, por pli efike eluzi spertojn de EU-programoj kiel Grundtvig. KT sendos raporton al DC; sekva kunlaboro okazos kadre de la universitata komisiono. KT mem ne starigos projektojn, sed pretas helpi al aliaj fari tion.

Konsentite organizi en 2010 Seminarion pri Subvencipetado (SPSP) por vastigi la konojn kaj spertojn kiujn havas nuntempe nur kelkaj personoj.

Jam decidite ke ILEI abonu retan katalogon pri eŭropaj subvencioj. JB kaj RP havas aliron al ĝi. Ni abonis en oktobro kaj ĝin uzos ĝis aprilo eksperimente, ĝi kostas €145. Aprile ni decidu ĉu reaboni. Indas bone legi la instrukciojn de LLP (Tutviva Lerno-Programoj). JB donas adreson kaj pasvorton; ni ne rajtas ŝanĝi la informojn. Oni devas atente rigardi ĉiujn instrukciojn, studi gvidliniojn kaj lerte kunigi niajn interesojn kun la intereso de EU (ekzemple momente: ligu EU-landojn kun Brazilo, Ĉinio, Meksikio, Bharato. Rimarko: la araba kaj la ĉina estas inter la grandaj lingvoj de la mondo... oni povas labori en tiuj landoj. DC: indas kunlabori kun multaj universitatoj kaj kun AIS.

Pri instruista trejnado ZK: kiel ni vidas praktikadon de instruado kaj instrukapabligo - mankas rajtiga diploma, tio ne estas bone, ĉar ni ne havas valorajn atestilojn kaj tio signifas, ke ni ne estas fortaj: kiel ILEI serĉu universitatojn, kiu faros tion. Al niaj instruistoj oni demandas “se vi instruas ĉu vi havas ŝtatan diplomon aŭ nur movadan?” Ni ne havas rajtigsistemon. Graveco de KER – tio difinas la rajton ekzameni kandidatojn. Kiel ni, Ligo de Esperantistaj Instruistoj intencas ŝanĝi eduksistemojn? ILEI devas havi agnoskon kiel trejnejo.

Dimanĉo 29.11.2009, posttagmeze

Alvenas CN, kaj ni transiras al temoj Rilatoj kun UEA, Strategia Plano kaj Kuba konferenco.

La Interkonsento inter UEA kaj ILEI bezonas renovigon. Komisiita al SMG kaj CN prizorgi tion. [Intertempe farita kaj akceptita de ambaŭ estraroj].

La kunsido rigardis la kurantan staton de la Strategia Plano 2011-2020. La cirkulita dokumento havas la sekvan strukturon:

p. 1-6 Nova projekto – tio impresas kompleksa kaj ne tuj travidebla.

p.7-12 Malnova plano – tiu apartigo ne estis evidenta.

p.13-14 Komentoj – internaj diskutoj inter UEA-estraranoj.

SMG opinias ke ILEI ne bezonas fari proprajn 10-jarajn planojn, nur zorgi ke edukado ricevu justan emfazon en la plano de UEA. Tiel la rilatoj UEA-ILEI povas esti proksimigitaj. Por ILEI sufiĉas pli konkretaj tri-jaraj planoj. La strukturo de la Strategia Plano devas fariĝi pli tuje komprenebla, troviĝas tro da specifajoj en la enkonduka parto, kaj la rolo de instruado frape mankas kompare kun la nuna plano. SMG eniros la diskutgrupon pri la plano.

CN: ĉu ILEI elektis novan A-komitatanon? SMG ankoraŭ ne, ni faros tion en aprilo 2010 kiam UEA faros tiun alvokon.

8.1 Kuba Konferenco

8.1.1 Informado, interalie tra IPR 2009/4.

Estas preta aliĝilo por IPR kaj por la retejo, kune kun teksto pri kondiĉoj; en ĝi estas la retadreso de JB, do ŝi preparos tabelon de aliĝintoj kaj sendos konfirmilon kaj bonvenigos ĉiun aliĝinton. JB sendos al la estraro ĉiumonate la staton de aliĝoj, kaj al SMG liston de donacintoj al Fondaĵo Dazzini. Bultenoj: respondecas AM. Aperu publikaj bultenoj kiel varbiloj, sed lastaj bultenoj estu nur por aliĝintoj. Por IPR 2009/4 DC preparos freŝan artikolon dupaĝan kun foto.

8.1.2 Programo

Ni sekvu la proponon farita en la Asembleo en Krakovo. Komence aŭ frue en ĉiu tago okazu mallonga kuna sesio, kie eblas skizi la tagon, disdoni informojn kaj krei senton de kuneco. Estu pli da vario en la program-tipoj, ne nur la formalaj prelegoj (40 min + diskuto) sed iu duhora eblo por simpozispecaj intervenetoj: 15min+5 diskuto= po 20min/prelego: do 2 horoj ebligas 8 prezentojn (kun unu koheriga gvidanto). Okazu krome paneldiskutoj, forumoj, por rompi enuon, por allogi, kun bonaj gvidantoj. Ni okazigu praktikajn lecionojn (ekzemple kiel faritaj de Natalia por blinduloj). Okazos paralele la seminario pri instruista trejnado – necesas integri la programojn, ekzemple model-lecionoj povas servi al ambaŭ aranĝoj.

AM: bone estos resumi la okazintajn sesiojn post la tago(ĉiu gvidanto resumu ĉu atingis sukceson, kiu estis la temo, kion traktis, ktp). Ni postulu de prelegantoj anticipe skriban tekston, por IPR kaj por ke tiuj, kiuj ne povos ĉeesti la prelegon havu eblecon ekscii la enhavon. Vespere tiuj resumoj povas esti prezentitaj. La dumkonferenca komisiono pri komunikado povas ludi rolon en ĉi tiu resumado.

Gravas pripensi pri Simpozio, ĉu aranĝeblas kun la apuda universitato. Se jes, povus okazi fine de la konferenco.

AM proponas prelegon pri la renovigo de Havano de renoma (ne-esperantista) arkitekto el tiu laboro. Akceptite.

8.1.3 Rilatoj kun hotelo

Gravas subskribi kiel eble plej baldaŭ kontrakton kun la hotelo. AM ricevos rajton tion fari nome de ILEI. LKK havas firman oferton, sed necesas stabiligi tion. Gravas subskribi kontrakton kun

invitanta instanco (Konferenca Regularo de ILEI 3.5). JB proponas: surloka persono devas fari pli detalan kaj konkretan buĝeton kaj sendu tion al JB.

8.1.4 *Limdatoj tra la preparmonatoj.*

Varbado, program-pretigo, program-enhavo, menuoj en E-o. Pluraj taskoj estas notitaj kaj aldonitaj al la laŭmonata plano kies monاتفolioj pendas mure en la kunsideo. [Tiu plano nun videblas en nia hejmpaĝo]. AM demandas: ĉu ekzistas kurso de la hispana lingvo per E-o. DC ricevas la taskon aperigi retligojn al enkondukaj kursoj en la hispana el Esperanto kaj aliaj lingvoj, laŭeble en februaro. Ni rekomendu bonajn filmojn pri Kubo.

8.1.6 *Surlokaj praktikajtoj:*

Starigo de dumkonferenca Komisiono pri komunikado; ni nomu apartan preleg-mastrumanton kiu ne devas esti LKK-ano por zorgi pri enkondukoj, diskutgvidado kaj dankoj, protokolado estu prizorgata, kiel ankaŭ dissendo de ĉiutagaj gazetaraj komunikoj kaj pretigo de materialoj por IPR.

8.1.7 *Partopreno en UK*

Tago de la Lernejo estas grava ero. Mihai povus bone gvidi tiun aranĝon, se li partoprenos. Ni devas zorgi ricevi salonon kun sufiĉaj sidlokoj, antaŭvideble 100-120 personoj (depende de la nombro de UK-anoj). CN- Dum UK en Bjalistoko tro longe daŭris salutado: je la nomo ILEI, pola sekcio, UEA kaj aliaj - tra 20 minutoj. La plano estas oferti KER-ekzamenojn dum UK, kaj se estas deziro en nia konferenco, okazigi la tradiciajn ekzamenojn de UEA/ILEI.

8.2 Konf 2011 kaj pli:

8.2.1 *Proponoj 2011.*

Estas du proponoj: Danio (Kopenhago) kaj Germanio (Herzberg). Ni havas skriban proponon pri Herzberg, skribajn informojn kaj parolan prezenton de RP pri Kopenhago. SMG parolis telefone kun Ileana Schroeder kaj eksciis ke se okazos la proponata seminario, ni povos ricevi senpagajn konferencĉambrojn en la sama ejo.

8.2.2 *Estrara komisiito por konferenco 2011.*

RP pretas preni tiun rolon. Akceptite. [Konfirmite per aparta estrara voĉdono poste]

8.2.3 *Perspektivoj por postaj jaroj.*

Informoj pri UK. Por 2012 UEA elektas inter Pusan (Korea Resp.) kaj Hanojo (Vjetnamio.) [Decidite januare ke Hanojo].

8.2.4 *Malkonferencaj aranĝoj de ILEI*

Rimedo por tutmondigo. Ne diskutita: la ideo estas ebligi aranĝojn sponoritaj de ILEI en mondpartoj kie konferenco ne estas aranĝebla.

9 Afrikaj planoj

RP evoluigos planojn kaj raportos.

10. Estrara funkciado

Necesas konsulti la tekston de Sjoerd pri repago de estraranaj kostoj. La buĝeto entenas 2800 EUR por vojaĝ- kaj restad-kostoj por la ne-konferenca kunsido. Tio aktive kontraŭlaboras la ĉeeston de estraranoj en la konferencoj (precipe foraj), kaj tion ni devas modifi. Ni havas moralan devon aperigi kelkajn estraranojn en ne-eŭropaj konferencoj. Parta helpo estas la rabato de 25% ĉe la konferenca kotizo, sed io pri la vojaĝkostoj restas fareda. Sekvenda la temo.

Oficaj kostoj (materialoj, poŝtmarkoj, telefonado, komputilo...) povas esti ĝis €200 sen pruvilo, pli ol €200 per pruvilo. Sed komence de la jaro oni difinas kiun vojon oni elektas... poŝtmarkojn ni pagas 100%, reto kaj telefono principe 50% krom se alia interkonsento estas atingita kun la kasisto.

Lunde: 30 de novembro

JB, ZK, DC, AM, CN, MJK, SMG, kaj gastoj Katalin Kovats (KK), Rob Moerbeek (RM)

Rilatoj ILEI-ICH

ZK informas pri ICH, suplemente al la skriba propono pri kunlaboro. ZK menciis mankon de ILEI-diplomoj kaj substrekis kunlaboron kun UAM en Poznań (trijara kursaro pri gramatiko, literaturo, metodiko – kaj unujaraj metodikaj kursoj), oktobre oni aldonis klerigadon per Gruntvig-projekto -- kiuj plenumos la postulojn de la kontrakto ricevos atestilojn. Printempe ŝi petis pri subteno (aldoninte modeltrejnkursojn), estas subteno de la urbo (unika situacio), oferto estas klare farita, voĉe kaj skribe.

La plano por stabiligi la bazon de ICH estas starigi laŭleĝan fondaĵon. Por tio estas bezonata komence €25mil eur kun celo atingi €50mil. La centro estas uzebla por lernado, kursoj kaj havas ampleksan bibliotekon kaj pliajn faciligojn. Petro Zilvar posedas la domon, la unua etaĝo estas apartigita por la movado.

Estas renovigita peto subteni la projekton, sed konkreta sumo ne estas menciita. Kompare estas demandita kial ni dediĉas €3000 por SES, dum ne por iniciatoj kiel ICH. [Postnota respondo: La projekto Interkulturo enkasigas tiun monon, do Interkulturo (ja konsiliĝe kun ILEI) rajtas decidi ĝian destinon.].

SMG: Ni interesiĝas evoluigi la kontaktojn kun ICH, atendas konkretan proponon kaj kontrakto-proponon, kun celo ekfunkcii kunlaboron ene de 2010. ILEI devos akiri superrigardon de siaj kapitalaj + fondaĵaj kontoj. [Postnoto: Tiu superrigardo de la sumoj nun ekzistas, restas scii la detalajn celojn kaj kuratorajn rajtojn je tiuj kontoj.]. La propono fariĝos multe pli interesa se ILEI povos ne nur (kun)organizi tie aranĝojn, sed ankaŭ tie enpostenigi longdaŭran, kapablan volontulon, tiel ke la centro iel servu kvazaŭ centra oficej(et)o por ILEI. Se tia evoluo povus okazi, ILEI konsideros starigi fondaĵon, 'ILEI-volontulo'.

Alvenas KK, do ni traktas la retejon <edukado.net>

KK skizas la enhavon kaj evoluon ĉe Edukado.net, fidante, ke la nova estraro decidus kunlabori pli aktive, kaj ke ekestu reciprokaj ligoj inter la hejmpaĝoj. ILEI povos fari rektajn ligojn al tiuj partoj kiuj pleje utilas al ILEI-anoj, ekz. la registro pri lokoj kie okazas instruado, la lerniloteke ks. Ĝis funkcios la nova paĝaro, sufiĉas unu ligo kun resumo pri la oferto. ILEI kuraĝigu al siaj membroj anonci siajn kursojn ĉe edukado.net. La nova arkitekturo estos pli facile uzebla, eblus ekzemple montri, reklamante Esperanton: 'vidu la paĝaron, kiom da lernejoj, kaj da universitatoj uzas E-on' au 'vidu, kiu uzas MAZI instruante E-on'.

Edukado.net ne kreas 'virtualecon', ĉiu povas vidi kiom da partoprenantoj aktivas; kiu ne uzas dum jaro la paĝaron estas forstrekata. En la paĝaro jam estas kolektitaj diplomaj kaj semestraj laboraĵoj, kaj tiujn eblas legi kaj esplori pere de tem- kaj vort-serĉoj. Datumbaza prilaboro de dokumentoj estas ekstreme valora por permesi tian serĉadon. Panteono de E-instruistoj ekzistas kaj meritas kompletigon.

ILEI konfirmas sian deziron ke la kunlaboro estu pli intensa kaj publike anoncata. Ni agnoskas, ke la laboro de edukado.net liberigas nin de multaj esencaj taskoj, tiel ke ni okupiĝu pri aliaj terenoj.

Instruisto-trejna kurso

Leviĝis en la aŭtuno propono plenumi trejnadon perrete. Edukado.net konsentis gastigi tion; akceptite, ke tio estos komuna projekto <edukado.net>-ILEI; pri la enhavo ĉefe zorgas niaflanke

DC. Necesas zorgi ke tio nek estu, nek aspektu kiel anstataŭaĵo de fizikaj kursoj, ekzemple tiuj ĉe UAM, kiujn ni daŭre subtenas. Ĝi havu malsaman karakteron, kaj la reta kurso kuraĝigu pluiron al fizikaj kursoj. Aliflanke ĝi povas servi kiel daŭrigejo por finintoj de mallongaj kursoj, kiel ĉe SES kaj 'flugiloj'. La kurso postulos lingvan kapablon je minimume B2, kaj estos modeste pagenda, kun ebloj solvi la aliĝon al tiuj, kiuj meritas tion. Ĝi havos liberan lernoritmon, kun multa uzo de filmitaj model-lecionoj kaj filmitaj prezentadoj pri diversaj instrumentoj. Plenumendaj ekzercoj testos la komprenon ĉe kursanoj. La baza kurso kovros metodikon de E-o kaj estos bazita parte je la enhavo de la *Manlibro pri Instruado de Esperanto*. Aldoniĝos specialiĝoj kursofine, ekzemple pri lingvistiko, fonetiko, literaturo, ĉiuj sub la gvido de elstaraj fakuloj en la kampo. La kurso havos ian gradon da mentorado kaj kontrolo de rezultoj – do interago inter kursanoj kaj projekt-gvidantoj. La kurso finiĝos per ekzameno, laŭplane okazigita en fizika renkontiĝo, kun la tasko gvidi modelan lecionon.

Manlibroj:

Restis ĉe UEA kelkaj ekzempleroj de la malnova eldono de la Manlibro. Post ties elĉerpiĝo ILEI povos proponi novan stokon el tiuj portitaj al NL.

Normoj kaj gvidoj:

Alvenas Rob Moerbeek (RM) kaj starigas kelkajn demandojn pri normoj kaj nia agado. Ĉu ILEI provizas konsilo-servon al la membroj, kiel ekzemple faras la Akademio pri lingvaj demandoj. Ĉu ILEI ofertas provlegan kaj recenzan servon al verkantoj eldonantaj lernilojn antaŭ la eldono. Ĉu ILEI esprimas sin pri la enhavo de novaj normigaj verkoj kiel PIV, PMEG - ĉu absolute aŭ nuance. Kiujn normojn sekvu aŭtoroj, korektantoj, instruistoj, ekzamenantoj? Ĉu por ekzamenoj ekzistas klaraj difinoj de la atendoj? Ĉu estas lerniloj kiuj traktas la specifajn bezonojn de difinitaj nacioj, ekzemple akuzativo por nacioj sen tio en sia propra lingvo, ĝusta uzo de la artikolo por slavlingvanoj ktp. Ĉu ILEI kritike sekvas retejojn kiel lernu.net, edukado.net, novan PIV-eldonon kaj didaktikajn novaperaĵojn? Ĉu ILEI rekomendas sekvi la novajn publikaĵojn de la Akademio? Ĉu estas gvido pri elekto inter sinonimoj, evito de konfuzo ĉe paronimoj, de ekuzo de novaj neologismoj? Ĉu ILEI esprimas sin pri la indikoj en PIV: EVI (evitendaĵoj) kaj ARK (arkaikaĵoj)? Komisiono pri lerniloj dezirindus, planoj pri bezonaĵoj, recenzoj pri esencaĵoj plejeble! Ĉu (kie) aperis la poento-aljuĝa normaro por memtestado laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro? Ekzemple indiki: 1 akuzativa eraro=1 erarpoento. Ĉu estas laŭnivela sciaro pri la E-kulturo?

Respondete: Konsilo-servo estas utila ideo, realigebla kiam ni trovos la funkciigontojn. Edukado.net jam provizas nin per tia servo. Simile pri antaŭ-eldona kontrolo de novaj lerniloj – ILEI-funkciuloj plenumis tiajn taskojn, sed formala servo ne ekzistas. Eldonitaj lerniloj ricevas abundan pritakson en <edukado.net> kaj de la retejo mem, kaj de vizitantoj, kaj de aldono de aperintaj recenzoj. La priskribo de lerniloj estas datumbaze aranĝita, tiel ke eblas pli facile trovi lernilon konvena por la propraj bezonoj kaj ricevi pri ĝi pritaksojn. ILEI mem enirus tiun terenon nur akirinte pli da helpantoj. Ĝi sporade rigardas partnerajn retejojn kaj laŭbezone komentas, sed fari tion sisteme bezonus centran oficejon de ILEI. Simile pri akademiazaj deklaroj, kategorioj en PIV kaj ĉia plia proponata laboro. Specimenaj testoj por KER-ekzamenoj haveblas en ĝia gvidilo, akirebla tra la libroservo de UEA kaj aliaj, simile pri la tradiciaj ekzamenoj de UEA-ILEI. Nur tiuj tradiciaj ekzamenoj eksplicite testas kulturajn konojn, ĝia gvidilo donas indikon pri la nivelo.

Konklude:

CN atentigas ke alvoko por landaj subvencioj por la kursoj de UAM devas esti baldaŭ farita, ĉar Landaj Asocioj jam kreas siajn jarajn buĝetojn. Envicigita por februaro. KK pledas ke ni subvenciu kelkajn gravulojn por atingi diplomojn de la KER-ekzamenoj, por ke tiuj kuraĝigu la aliajn.

Venante al la fino, la estraro traktas kelkajn praktikajn temojn kaj lasas la neatingitajn por reta pritrakto. Kelkaj estraranoj emfazas la valoron kunlabori kun pli vasta gamo da agantoj, laborantaj

konforme kun niaj celoj. Gvidiloj por estrara laboro estu la nova estrara vizio kaj la laŭmonata plano.

===== Fino de la kunsidado en la frua posttagmezo.=====

Protokolis: MK/SMG.